

Groupe Espérantiste Périgourdin (GEP)

Cours d'espéranto, conférences, expositions...

17 lotissement de l'aérodrome 24330 BASSILLAC Tél. : 05 53 54 49 71

<http://esperanto-gep.asso.fr>

esperantoperigord@yahoo.fr

Présidents d'honneur : Jacques GREGOIRE et Jacques RAVARY.

Président : Ange MATEO, 24330 Bassillac

06 88 74 94 78 angemateo@yahoo.fr

Vice-président : Maurice JUY, Les Campagnolles, 24370 Calviac en Périgord.

05 53 59 60 27 monique.juy@wanadoo.fr

Vice-président : Claude LABETAA, 17, lotissement de l'aérodrome, 24330 Bassillac.

05 53 54 49 71 labetaa.claude@wanadoo.fr

Secrétaire : Martine DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 martine.demouy@wanadoo.fr

Secrétaire adjointe : Michèle DELPEY, 31, rue Antoine Gadaud, 24000 Périgueux.

05 53 09 30 88 lmdepey@gmail.com

Trésorier : Max DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 max.demouy@wanadoo.fr

Trésorière adjointe : Anne-Marie GALESNE, 96, rue Gambetta, 24000 Périgueux

05 53 53 94 13 anne-marie.galesne@orange.fr

Déléguée auprès des jeunes : Alexia AUGRAS, 121, boulevard du Petit Change, 24000

Périgueux 06 89 15 89 24 alexia.augras@orange.fr

Relais locaux (des espérantistes près de chez vous) :

Bergeracois : Luc BAHIN, Le Pouyoulou, 24140 Beauregard et Bassac.

05 53 80 09 38 luc.bahin@free.fr

Mussidanais : Richard RIO, 25 rue Arzens, 24400 Mussidan.

05 53 82 69 71 r.rio@laposte.net

Périgueux et agglomération : Claude LABETAA (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Saint Cyprien : Odette JARDIN, lieu-dit Escavailles, 24220 SAINT CYPRIEN

05 53 29 32 75 odet.jardin@orange.fr

Sarladais : Maurice JUY (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Informilo / Bulletin d'information

Rédaction collégiale. Mise en page Claude Labetaa. Envoyez vos documents, si possible en format numérique à labetaa.claude@wanadoo.fr, avant le :

1^{er} février pour le n° du printemps

1^{er} mai pour le n° de l'été

1^{er} août pour le n° de l'automne


1^{er} novembre pour le n° de l'hiver.

Cotisations 2016 (de sept 2015 à août 2016)

Sauf erreur de notre part, vous êtes dans la situation suivante : ☐ service gratuit

☐ adh 2015 ☐ sout 2015 ☐ adh 2016 ☐ sout 2016 ☐ veuillez régler :

Attention ! Nous proposons maintenant une adhésion commune Espéranto-France - Groupe Espérantiste Périgourdin ouvrant droit à déduction fiscale. Bulletin et précisions sur demande aux adresses ci-dessus ou auprès de nos animateurs.



ESPERANTO

Périgord

INFORMILO n-ro 103

Printemps 2016

Le bulletin d'information du Groupe Espérantiste Périgourdin,
trimestriel en français et en espéranto.



L'espérantiste pakistanais Saeed Ahmad a beaucoup apprécié la visite de Lascaux II (voir page 2)

- Informadiko kaj komputiloj (daŭrigo) page 3
- Stranga Ovo, d'après Christian Grenier page 4
- En la Atendejo : sketch en espéranto page 9

kaj tiel plu...

Veuillez nous pardonner le clin d'œil de la photo de couverture !

Contrairement à ce que laisse penser le photomontage de couverture, la Semitour Périgord (l'organisme gérant la grotte de Lascaux) n'a pas gravé en espéranto "Les visites commencent ici" en l'honneur de l'espérantiste pakistanais Saeed Ahmad. Notre ami ayant visité Lascaux II le 6 avril, il s'agit, certes avec un peu de retard, d'un poisson d'avril. Mais ce qui est certain, c'est qu'il a beaucoup apprécié la visite.

Plus sérieusement, la venue de Saeed a été l'occasion pour beaucoup d'entre nous de connaître le soufisme, une doctrine musulmane ouverte et tolérante, selon Saeed, ce qui est très précieux dans le monde actuel.

Jugez-en par les premiers mots d'introduction de son dernier livre, "Panĝaba Sufia Saĝo", soit "La Sagesse du Soufisme du Pendjab" :

"Jen mia libro, kiu estas eta klopodo por montri la mildan bildon de spirita islamo al mondanoj. [...] La ĉefa celo de tiu ĉi libro estas krei toleremon, komprenemon kaj interfratiĝon inter kredantoj kaj nekredantoj." Soit :

"Voici mon livre, qui est un petit essai pour montrer aux peuples du monde l'image douce d'un islam spirituel. [...] Le but principal de ce livre est de créer tolérance, compréhension et fraternité entre les croyants et les non-croyants."

N'oubliez pas notre assemblée générale

Elle aura lieu à Bassillac le samedi 25 juin (détails page 11).

Nous recevrons bientôt Abdurahman Junusov, espérantiste du Daghestan

Parti de Toulouse, il sera à Brive dans l'après-midi du vendredi 24 juin. Nous lui proposerons vraisemblablement une visite de la grotte de Lascaux puis une soirée à Périgueux. Téléphonez à Claude au 05 53 54 49 71 si vous souhaitez le rencontrer dès vendredi soir. Il rencontrera l'ensemble du groupe le lendemain lors de notre AG avant de rejoindre nos amis du Limousin.

Deux textes en espéranto dans ce numéro

Stranga Ovo : Ange a traduit (pages 4 à 8) une nouvelle de Christian Grenier, l'auteur périgourdin qui l'avait déjà inspiré notamment avec Le Tyran, le Luthier et le Temps.

En la Atendejo : Claude vous propose pages 9 et 10 un sketch de son cru, dont les mots ou expressions les plus difficiles ont été traduits (à la fin du texte) afin d'encourager les débutants à pratiquer et approfondir notre langue.

Samedi 25 juin : l'assemblée générale du Groupe Espérantiste Périgourdin

Elle aura lieu de 10 h à 16 h à la salle des fêtes de Bassillac. Les portes seront ouvertes dès 9 h 30 pour accueillir les participants.

La matinée sera consacrée à l'AG proprement dite. Nous mangerons à midi au restaurant asiatique "Planète Wok", de Boulazac, qui nous a déjà reçus plusieurs fois. L'après-midi sera consacrée à Abdurahman Junusov, espérantiste du Daghestan, qui sera notre hôte depuis la veille au soir.

Le congrès universel aura lieu à Nitra (Slovaquie)

Très précisément du 23 au 30 juillet 2016. Une petite délégation périgourdine y participera.

Renseignements : <http://www.nitra2016.sk>

Kvinpetalo (4 rue du Bureau, 86410 Bouresse)

Renseignements : <http://kvinpetalo.org>

Ce site était en maintenance au moment de boucler ce numéro, mais allez dès que possible le visiter car Kvinpetalo vous propose régulièrement des stages de qualité.

Le château de Grésillon (St.Martin d'Arcé, 49150 Baugé)

Un programme très riche cet été !

Du 12 au 17 juin : La Loire au fil des mots. Semaine touristique (châteaux de la Loire, demeures d'écrivains...) animée par Catherine Kremer et Jannick Huet.

Du 4 au 15 juillet (selon options touristiques) : Echanges de savoirs et de savoir-faire, cours d'espéranto, expression du temps dans cette langue avec Elizabeth Barbay et Christian Rivière.

Du 6 au 15 août (selon options touristiques) : 5 niveaux de cours d'espéranto avec Mikaelo Bronštejn (Russie), Tim Morley (Angleterre), Przemek Wierzbowski (Pologne), Christophe Chazarein, Marion Quenut. Nombreuses activités avec Ŝomart et Nataša (chant), Marie Savary, Dominique Baron.

Du 21 au 28 août : une semaine pour les enfants et les familles, avec Jean-Luc Kristos, Ansofi Markov, Elizabeth Barbay, Bert Schumann.

Renseignements et inscriptions : <http://www.gresillon.org>

A - En ĉi tiu.

Ŝi montras la dekstran.

C malfermas siajn du manojn.

C - Bedaŭrinde ĝi estas en la alia. Bonvolu eksidi sur la dua seĝo... kaj vi sur la unua.

La du sinjorinoj sidiĝas sur la ĵus atribuitaj seĝoj. La tria ne sidiĝas kiel atendite sur la tria seĝo sed iras al la pordo.

La du ceteraj tuj ekstaras.

A - Sed kion vi faras? Ni estis ĉi tie antaŭ vi!

B - Aĉa virino! Vi donis lecionon al ni kaj nun vi profitas!

C plilaŭtigas sian voĉon.

C - Sufiĉas nun! Ni jam perdis sufiĉe da tempo! Ankaŭ mi havas tre bonan kialon unuavice trapasi ĉi tiun pordon! La kuracisto estas mi!

Quelques traductions pour nos débutants

supreniri = iri supren (avec accusatif de destination) = monter

malsupreniri = descendre

kuraci = soigner (prescrire un traitement) kuracisto = médecin

ŝtupo = marche aro = groupe, ensemble ŝtuparo = escalier

atendejo = ejo (loko) por atendi = salle d'attente

ambaŭ = les deux, tous deux (ambos en espagnol, préfixe ambi de ambidextre)

plirapidiĝi = iĝi pli rapida = accélérer (devenir plus rapide)

ĝentila = poli (c'est un faux ami) ĝentile = poliment

teni = tenir elteni = supporter

alproksimiĝi = iĝi pli proksima al = s'approcher de (devenir plus proche de)

stulta = idiot stultaĝo = aĝo stulta = idiotie (chose idiote)

stultulo = ulo stulta = (individu) idiot, que l'on peut féminiser par stultulino

naski (transitif) = donner naissance à naskiĝi = naître

virinaĉo = aĉa virino = vilaine bonne femme (le suffixe aĉ est péjoratif)

fi = préfixe signifiant le mépris fiulino = encore une amabilité !

vico = rang, tour unuavice = au premier rang, en premier, la première...

mono = argent ero = élément monero = pièce de monnaie

INFORMADIKO KAJ KOMPUTILOJ (daŭrigo)

far Claude Labetaa

Hodiaŭ mi proponas al vi (re)malkovri la vortojn uzatajn en la reto, aŭ interreto (*réseau, toile, internet*), kiu estas tute taŭga rimedo por komunikiĝi, kompreneble esperantlingve, kun la tuta mondo.

Vi unue bezonas aliron al la reto. Tiun aliron proponas provizanto de retkonekto (*fournisseur d'accès*), kiun oni nomas ankaŭ interretperanto.

La angla esprimo WorldWide Web (WWW) tradukiĝas per TutTera Teksaĵo (TTT). La programo, kiu serĉas por vi, estas retfoliumilo aŭ TTT-legilo (*navigateur web*). Kiam vi alklakas ligilon (*lien*), tiu lasta kondukas vin al retpaĝo (*page internet*), kiu estas ero de TTT-ejo, retejo aŭ paĝaro (*site internet*). Blogo estas reta taglibro pli persona.

Por viziti viajn kutimajn retejojn, kiel ekzemple edukado.net aŭ lernu.net, vi devas unue ensaluti (*vous connecter*) uzante vian salutnomon aŭ uzantnomon (*nom d'utilisateur*) kaj fine elsaluti (*vous déconnecter*). Ne forgesu vian pasvorton (*mot de passe*) sed ne sciigu ĝin al nekonatoj!

Se iu disponebla dosiero interesas vin, vi povas ĝin elŝuti (*le télécharger*) sed por krei vian blogon vi devas alŝuti (*charger*) dosierojn: tekstojn, bildojn, sondosierojn, videojn...

Por komunikiĝi kun diversaj korespondantoj, kies ret(poŝt)adreson (*adresse internet*) vi konas, vi skribas, sendas kaj ricevas retmesaĝojn (*messages, courriels*) sen aŭ kun kunsendaĵoj (*pièces jointes*). Por sendi al pluraj personoj vi antaŭe povas krei dissendoliston (*liste de diffusion*).

Vi povas komunikiĝi ankaŭ per la socia komunikilo Fejsbuk' (*Facebook*) aŭ ankaŭ pepi (*tweeter*). Persone mia preferata socia komunikilo estas "Ipernity", malpli fama sed kie partoprenas multe da esperantistoj. Diversaj retejoj proponas al vi tujmesaĝilon (*messaging instantané*).

Vi ankaŭ povas uzi programojn, kiel Skajpon (*Skype*), kiuj ebligas al vi paroli de komputilo al komputilo kun korespondantoj el la tuta mondo. Retkamerao (*webcam*) ebligas praktiki videokonversaciojn. Vi povas scii, kiuj el viaj kutimaj korespondantoj estas enretaj (*en ligne*).

Por fini ĉi tiun artikolon ni ne forgesu kelkajn ĝeneralajn mendojn kiel: kopii (*copier*) (el)tondi (*couper*) kaj alglui (*coller*) aŭ validigi (*valider*), nuligi (*annuler*), malfermi (*ouvrir*), konservi (*enregistrer*)...

Por pli multe lerni: <http://komputeko.net>

(dankon al Julien Becan pro la ligilo)

STRANGA OVO
de Christian Grenier, tradukis Ange Mateo

1

Malproksime, direkte al la arbaro ekokazis seka fulmo kaj poste la muĝo de tondro.

- Mi ja diris al vi, ke la meteostacio aŭguris pluvon! ekkriis Silvio. Sprite! Ni foriris el la vilaĝo antaŭ duonhoro kaj nun ni spertos pluvegon... ek, ni reiru!

Li ĉemane kaptis Sofion, devigis ŝin returne iri kaj kuntiris ŝin kurante sur la ŝtonkovrita pado. Baldaŭ spirmanka ŝi devigis lin malrapidiĝi kaj montris al li la julian sunon, kiu forte frapis.

- Ne tiel rapide! Ĉu vi ne trovas tion stranga, fulmotondron sen nuboj? Vidu, la ĉielo estas blua kaj tute libera.

- Ili malrapidiĝis. Ambaŭflanke de la vojeto la griloj ĵus ekkriis plejlaŭte. Iom antaŭ la bosko bovinaro plu paŝtiĝis kvazaŭ nenio estus okazinta.

Silvio grumbliis :

- Tamen mi ne revis! Vi vidis tiun fulmon tiel bone, kiel mi, ĉu ne? Kaj tondris tuj poste! En Parizo tio estas signo de fulmotondro. Sed eble tio ne similas en Perigordo, ĉu?

Tiu humuraĵo ofendis Sofion, kiu ŝultrumis. Ŝi naskiĝis tie kaj ŝiaj gepatroj estis kultivistoj. Ili timegis la fulmotondrojn, kiuj dum la tritikorikolta sezono fuŝis la rikolton; sed ŝi neniam vidis pluvon fali, kiam la ĉielo estas tiel blua! La posttagmezo sin anoncis belega. Cetere, la meteostacio prognozis, ke la vetero malboniĝos nur vespere. Hezite Silvio aŭdacis:

- Ĉu vi opinias, ke ni povus plu promenadi ĝis Monfaucon? Monfaucon estis la najbara vilaĝo; ili povus tie trovi ŝirmejon, se pluvego trafus ilin. Sofio miris, ke Silvio petas ŝian opinion. Plej ofte li decidis ĉion pretekste, ke li estas je unu jaro pli aĝa ol ŝi. Tamen kelkfoje ŝi ŝnuris al li la bekon: tiu Parizano ne kapablis distingi pomarbon de kverko, nek virŝafon de ŝafino !

Subite li ŝovis la manon en la poŝojn de sia ŝorto. Nel... La sandviĉoj de la manĝeto ankoraŭ estis tie. Li momente timis, ke kurante li perdis ilin. Sofio malrapidiĝis kaj subite ekhaltis.

- Silvio, rigardu: jen ovo!

Tio ja estis rimarkinda malkovro: tute nova ovo ĝuste meze de la vojeto! Silvio kliniĝis kaj delikate kaptis la ovon per la dekstra mano.

- Ni rajtas kunporti ĝin, ĉu vere? Ĉiukaze neniam la farmistoj venos ĉi tien serĉi ĝin!

Sofio jesis ridetante kun indulgo: ŝia kunulo estis tiel fiera, kvazaŭ li estus malkovrinta kvarfolian trifolion! Sed baldaŭ, li paliĝis, kuntiris la brovojn,

EN LA ATENDEJO
skeĉo de Claude Labetaa

Du sinjorinoj (A kaj B) supreniras ŝtuparon kaj atingas la pordon de la atendejo de kuracisto.

A - Saluton sinjorino. Ĉu tie ĉi estas la atendejo?

B - Jes. Ankaŭ mi iras.

Ili eniras kaj ambaŭ samtempe plirapidiĝas por atingi la unuan seĝon. Antaŭ la seĝo ambaŭ haltas.

A - Pardonu, sed mi estas la unua.

B - Tute ne! Mi estis la unua ĉe la pordo de la konstruaĵo kaj mi ĝentile tenis la pordon por vi.

A - Sed mi devas urĝe viziti kuraciston. La kapo tre forte doloras al mi...

B - Al mi doloras la ventro kaj mi ne povos elteni...

A - La kapo pli gravas ol la ventro!

Dume tria sinjorino alproksimiĝas kaj silente atendas.

B - Kiel vi povas aserti tiajn stultaĵojn! Se ne ekzistus ventro vi ne povus naskiĝi!

A - La stultulino estas vi!

B - Kia virinaĉo! Lasu min sidiĝi!

A - Jes! Sed sur la dua seĝo! Fiulino!

C - Ho! Sinjorinoj, mi petas. Bonvolu kvietiĝi. Kio okazas?

A - Mi alvenis unuavice por atendi la kuraciston.

B - Tute ne! Mi estis la unua.

A - Mi havas fortan kapdoloron!

B - Kaj mi suferas pro neeltenebla ventrodoloro!

C - Ha! Ne necesas kvereli pro tio! Vi ŝajne estas respektindaj sinjorinoj, ĉu ne? Mi proponas ion al vi. Ke la hazardo elektu.

Ŝi eligas moneron el sia poŝo kaj ĝin montras.

C - Jen estas monero.

Malantaŭ ŝia dorso, kaŝe de la du sinjorinoj, ŝi metas la moneron en sian maldekstran manon. Kaj nun ŝi prezentas ambaŭ fermitajn manojn.

C - En kiu mano nun estas la monero? Vi! Respondu! (alparolante A-n)

nenion diri. Atendu: por la reveno vi devos teni la ovon en la maldekstra mano.

Silvio obeis. Li intencis amike gesti al sia gastiganto per sia libera mano. Sed jam lia brako iĝis peza; lia korpo glaciigis. La metalaj vandoj de la ĉambro ekbrilis kun ne eltenebla intenseco.

Poste regis la nenieco... kaj tiu fabela sensaĵo de ŝvebado!

3

- Silvio! Kio okazis?

Sofio ekkuris al sia kunulo, kies silueto rekreiĝis meze de la vojeto.

- Mi tiom timis! Ŝi diris premante lin al si. Kio okazis al vi? Ĉu vi ne estas vundita?

- Ne. Atendu. Mi tuj klarigos al vi. Diru al mi, ĉu vi vidis nenion?

Revigligita, Silvio konstatis, ke la grundo estis refirmiĝinta sub liaj piedoj. Li malpezigite spiris agrablan odoron de tranĉita fojno.

- Jes ja, respondis Sofio. Mi ekvidis motorbicikliston. Kial?

Silvio tiam rimarkis, rande de la arbaro, ulon vestitan per blua kombineo, kliniĝantan... kvazaŭ li serĉus objekton en la herbejo! Lia brila kasko lumis sub la suno.

- Motorbicikliston? ridetante diris Silvio. Min atendu sekundon, mi redonu ion al li.

- Kion?

- Lian motorbiciklon!

Li kuris ĝis la arbara rando. La silueto ŝajnis fuĝi sed Silvio prezentis la ovon per etendita brako. Li rekonis la globecan vizaĝon, la ovalajn kaj nigrajn okulojn, la rozkoloran strekon de la buŝo.

- Mi opinias, ke tio apartenas al vi, ĉu ne? li diris prezentante la ovon.

La vojaĝanto momenteton hezitis; kaj ekprenis la objekton vigle kapjesante.

- Ho, ne danku min! Mi ĝojas, ke mi helpis vin! Sed vi scias, ke oni ja sapumos viajn okulojn ĉe via reveno! Ha: kaj kontrolu viajn poŝojn, certe unu estas truita.

Sen atendi respondon, Silvio rapide malsupreniris la herbejon sub la kvietita rigardo de bovinoj; necesus multe pli por ke ili interrompu sian manĝon.

- Kaj nun ni reiru, li tutĝoje diris rekuniĝante kun Sofio.

- Ĉu vi finfine tuj klarigos al mi? Kaj... kien ni iros? Ĉu vi opinias, ke ni povos atingi Monfaucon?

Silvio levis la kapon, spertece flaris la venton kaj asertis:

- Jes. La fulmotondro jam ĉesis! Ni daŭrigu la promenadon.

Sed enŝovante la manon en sian poŝon, li konstatis ke la sandviĉoj malaperis.

- Kaj ne, li spite plu diris. Ni reiru hejmen manĝeti.

demandis:

- Ĉu vi opinias, ke tiu ovo estas freŝa?

- Evidente! Ĝi ne estis ĉi tie, kiam ni pasis, antaŭ malpli ol kvaronhoro! Iu perdiĝinta kokino venis ellasi ĝin sur la padon.

Kion Silvio ne aŭdacis diri, estas ke, tiu ovo strange malvarmas, se oni supozas ĝin ĵus demetita. Cetere ĝi restis sub la suno... Ĉu malvarma? Ne: ĝi estis frosta!

- Nun li iris ne kuraĝante malfermi la manon. Io stranga estis okazanta: lia dekstra brako rigidiĝis, malrapide paraliziĝis. Li estis certa, ke la ovo pumpas la tutan energion de lia korpo!

Li tiam volis paroli... krii! Neeble: ĉiuj membroj liaj estis nesensivaj; sed li plu antaŭeniris, mekanike. Ŝajnis al li, ke li iĝis nepalpebla, travidebla.

Subite li konsciis, ke liaj piedoj moviĝis en la vakuo! Li ne plu sentis la aspran kaj trankviligan kontakton de la ŝtonetoj sub siaj paŝoj. Antaŭ liaj okuloj, la pejzaĝo iom post iom dronis en nekonatan nebulon. Li subite sentis sin ensuĉita de mistera forto!

La brilo de nekonata suno blindumis lin.

Sofio jen eligis krion: ŝia kamarado perdis tutan konsiston, li iĝis fantomo, kiu fibriĝis same kiel rebrilo en la akvo samtempe kiam li malproksimiĝis. Sur la vojeto, lia formo malnetiĝis... kaj poste tute malaperis!

2

Silvio, kiu daŭre marŝis, komprenis ke, fronte al li, la suno estis nur la banala kaj artefarita brilo de dika lampo de skribotablo.

- Nu, ZP 637, kio nova?

La paroloj, kiujn li ĵus aŭdis, ne estis laŭte prononcitaj... ili ekaperis en lia cerbo! Li tuj komprenis ilian sencon. Subite li stumblis kontraŭ metala meblo kaj haltis.

- Sed... kiu vi estas?

Strange, pensis Silvio, kiu ŝvebis en ia revo, ŝajnas, ke oni tiklas al mi la cerbon!

- Neniu tiklas vin! Respondu: kiu vi estas?

Ĉi-foje, la realeco sin trudis al li, absurda, freneza: li staris en sfera ĉambro, kovrita per brila metalo. Antaŭ li, speco de skribotablo. Kaj malantaŭ tiu skribotablo... homo. Be! ne, ne estis vera homo.

Silvio retropaŝis, terurita. Kiu estas tiu kreitaĵo, kiu en kelkaj momentoj ekaperis antaŭ li? Kaj kiel li, Silvio, povas troviĝi ĉi tie, kiam unu minuton antaŭe li marŝis al la vilaĝo?

- Kion vi faras ĉi tie?

La nekonato stariĝis. Li ja posedis du brakojn kaj du kruojn, sed lia vizaĝo similis tiun de eksterterano de bildstrio: temis pri pala globo kun du ovalaj perloj anstataŭ la okuloj. Tiu rozeta horizonta streko certe estis buŝo!

- Hm! Mi... nu... balbutis Silvio.

- Ne parolu! ordonis la kreaĵo sen movi siajn lipojn. Mi ne komprenas vian lingvaĵon. Pensu! Kion vi faras ĉi tie?

- Mi ja ŝatus scii tion! forte pensis Silvio celante sian kunparolanton. Mi estis revenanta el promenado kun Sofio, mia amikino, kiam mi malkovris, meze de la vojeto, ovon. Tuj kiam mi enmane havis ĝin...

- Ha, mi komprenas!

La nekonato sidiĝis sur ian pneŭmatan tabureton. Li invitis Silvion imiti lin.

- Vi povas tien meti la ovon. Jes, ĉi tien, mi petas.

- Silvio metis la objekton - bone pripensite, tio sendube ne estis ovo! - mezon de ujo hirtigita de dratoj.

- Vi prenis la individuan transsendilon, kiu ebligis al ZP 637 resti en kontakto kun ni. Estas bedaŭrinda eraro.

- Sekvis serio da sakraĵoj nekompreneblaj sed certe abomenaj. Kaj poste listo da sankcioj celantaj puni ZP 637 pro lia neglektemo.

- Ĉar tiu, be... tiu ovo, ĉu ne? komencis Silvio.

- Fakte, temas pri malmateriigilo-transportilo. Estas iu aparato, kiu ebligas, ke niaj delegitoj tuj revenu sur sian originan mondon cele tien alporti specimenojn.

- Sian... ĉu sian originan mondon? balbutis Silvio, kiu pene ordigis siajn pensojn. Ĉar mi ne plu estas sur Tero, ĉu?

- Ne. Ni troviĝas sur planedo situanta je pluraj lumjaroj de via suna sistemo.

La eksterterano mildiĝis, la tono de liaj pensoj ŝajnis malpli abrupta. Silvio siaflanke sentis sian racion malfortiĝi. Li glutis kaj reparolis, skuante la kapon:

- Nekredeble! Sed tiu, be... tiu ovo perdita de... ZP 637, kiel ĝi povas transporti iun?

La nekonatulo tiam transdonis al li la plejĉefaĵon de kompleksa procezo, kiun oni povis resumi tiel: ovo / kontakto kun la haŭto / ligado kun la cerbo / informoj al la ĉeloj / ĉeloj dismetitaj de la ova energio / ĉeloj reorganizitaj sur la origina planedo...

En la menso de Silvio la bildoj, kiujn transsendis al li la eksterterano akcele sinsekvis. Li komencis ekvidi la veron kaj demandis:

- Kiucele via... ZP 637 venis sur Teron?

La buŝo de la eksterterano grimacis amaran rideton.

- Pripensu! Sekve de kataklismoj kaj senprudentaĵoj, nia grundo malriĉiĝis.

Nuntempe nia natura medio estas detruita. Niaj vegetaloj malaperis kaj la malsatego minacas nian planedon! Ni serĉas novajn produktojn por nutri nian loĝantaron, precipe plantojn, kiuj povus aklimatiĝi sur nia mondo. Tial ni sendas per spacialaj veturiloj astronautojn komisiitajn alporti tien vegetalajn specimenojn!

- Ha! mense ekkriis Silvio, mi nun komprenas!

La fulmo... la tondro! Tiel sur la Tero manifestiĝis la alveno de la spaciala veturilo!

- Sed kial vi uzas kosmajn ŝipojn kvankam vi disponas... ovon multe malpli embarasa kaj pli taŭga?

- Pripensu: ja necesas, ke ovo mem estu alveninta sur la koncernan planedon!

La eksterterano stariĝis, skizis ĝentilan geston, kiu similis al adiaŭo. Kaj li eldiris, pelmele kaj humile:

- Pardonpeto de la planeda delegito / Espero ke la juna Terano pardonos siajn gastigantojn pri tiu okazaĵo / Nepra diskreteco petita / Severaj punoj kontraŭ tiu stulta ZP 637 / Devigo tuj rehejmenigi Silvion sur lian originan mondon...

- Atendu! intermetis Silvio esplorante siajn poŝojn. Mi eble povas helpi vin...

Li metis sur la skribotablon du iom dispremitajn sandviĉojn. Estis stulte kaj ridinde. Kiel duono de bastonforma pano povus helpi al pluraj milionoj, pluraj miliardoj da eksterteranoj? Ĉe lia granda miro la planeda delegito ekkriis:

- Ha! Tre interese, dankon.

Per tentakla mano li ekprenis la sandviĉojn kaj enŝovis ilin en aperturon de la muro, speco de forno enlokita. Klapo refermiĝis. Kaj sur la ekrano, kiu superelstaris la aparaton eksinsekvis signoj, verŝajne kemiaj simboloj!

- Ni vidu... la atomaj formuloj: salo, gisto, protidoj, lipidoj...

- Be... mi kredas, ke tio estas pano, butero kaj ĉokolado!

La tri elementojn selektis la komputilo. Kaj Silvio, konsternita, vidis la bildon de tritika grajno aperi. Kaj de spiko. Kaj ankaŭ tiun de kakaoarbo. Fine, tiun de bovino, iom mallerte restarigita, indas agnoski!

Videble kontenta, la eksterterano sin turnis al sia gasto:

- Tiuj produktoj ŝajnas perfekte adapteblaj al nia mondo! Ni tuj restarigos ilin! Nome de la tuta loĝantaro de nia planedo, mi dankas vin pro via helpo, Silvio. Vi estas nete pli efika ol tiu mallertulo ZP 637! Ĉu vi povus konfidi al ni tiujn nutraĵojn?

- Ho, mi volonte donacas ilin al vi!

Cetere, Silvio ne trankvile manĝus la sandviĉojn post ilia restado en tiu stranga mikroonda forno!

- Nun vi tuj foriros. Ha... se vi retrovos ZP 637, diru al li... Ne. Vi povos